# TEA-BULTENO

6A JARO — NOVEMBRO - DECEMBRO 2003 — NUMEROJ 11-12

## PROGRAMO EN TEA - NOVEMBRO

| | |
|---|---|
| 04 - mardo | h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"<br>h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 07 - vendredo | h. 20.00 - "*Veronica di Desenice*, virino el Mezepoko" prelego itallingva fare de *Albano Pellarini* |
| 11 - mardo | h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"<br>h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 14 - vendredo | El Esperanta Gazetaro |
| 18 - mardo | h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"<br>h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 21 - vendredo | Enigmoj en Esperanto |
| 25 - mardo | h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"<br>h. 20.00 - Preparlaboroj por ekspozicio pri Kripoj |
| 28 - vendredo | h. 20.00 - *Lecturae Dantis* en Esperanto |

## PROGRAMO EN TEA - DECEMBRO

| | |
|---|---|
| 02 - mardo | h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"<br>h. 20.00 - Preparlaboroj por ekspozicio pri Kripoj |
| 05 - vendredo | Ekspoziciaj preparlaboroj |
| 09 - mardo | h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"<br>h. 20.00 - Ekspoziciaj preparlaboroj |
| 12 - vendredo | h. 20.00 - Ekspoziciaj preparlaboroj |
| **15 - lundo** | **h. 17.00 - Inaŭguro de la ekspozicio "Kripoj en la mondo" ĉe TEA-sidejo kaj Zamenhofa Festo** |
| 16 - mardo | h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"<br>h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 19 - vendredo | h. 20.00 - Bondezira Festo kun Paĉjo Kristnasko |
| 23 - mardo | h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"<br>h. 20.00 - Kartludado |
| **26 - vendredo** | **Sidejo fermita** |
| 30 - mardo | h. 20.00 - Ni kune adiaŭu la forirontan Jaron 2003an! |

**Lunde kaj ĵaŭde okazas baza kurso de Esperanto, respektive je la 19a kaj je la 17a horoj**

**Al vi ĉiuj korajn bondezirojn de Feliĉaj Festotagoj!**
Ni revidos nin mardon la 6an de januaro 2004!

**Kara Leganto!**

Se atente vi legis la ĉi-flankajn programojn, certe jam vi notis en via poŝa aŭ surmura kalendaro la tagojn, dum kiuj okazas la plej interesaj eroj. Certe vi ne intencas maltrafi la prelegon pri "Veronica, virino el Mezepoko" - temas pri aŭtentika historia perlo! Plie, ne perdu la eblon plikleriĝi per intense instrua vespero dank' al prezentado de Dantaj versaĵoj! En alia vendredo oni povas eĉ amuziĝi, cerbumante pri malfacilege solveblaj krucvortoj - elmontru tiam viajn prilingvajn konojn! Kaj ne forgesu, ke ĉiumarde ekzercas sin, pasie kaj fervore, koruso "Verdaj Anĝeloj", kiu daŭre serĉas novajn gekantemulojn.

Fine de novembro ni komencos labori por prepari la decembran ekspozicion pri Kripoj, kies inaŭguro okazos lunde la 15an de decembro. En salono de nia sidejo ni muntos elmontradon de kelkdeko da kripoj devenantaj el pluraj mondaj partoj. Ĉiu estas varme invitata kunhelpi, por ke ĝi estu kiel eble plej alloga kaj vidinda. La ekzpozicio estos vizitebla dum ĉirkaŭ 10 sinsekvaj tagoj kaj kompreneble malfermita al publiko. Dum la inaŭgura tago ni kaptos la okazon honori nian Majstron per taŭga memorigo.



Fine, kune kun Paĉjo Kristnasko, kiu ĉeestos kunportante sian grandan sakon plenplenan de riĉaj donacoj, ni atendas vin vendredon la 19an de decembro kaj, lastafoje en ĉi tiu jaro, nome la 30an, ĉiu estas varme invitata kuntosti en gaja etoso je ĉies sano kaj je bona progreso de nia Esperanto dum la tuta venonta 2004a jaro.



Mi esperas ke vi, kara Leganto, trovos sufiĉe alloga ĉi tiun programon kaj ke via konsento sin klare esprimu per konstanta ĉeesto en la diversaj TEA-aranĝoj.

Do, ĝis la revido plej baldaŭ!

Via Bulteno-redaktantino *Elda Doerfler*!

EL POPOLA ĈINIO

Jam nun komencu pensi pri ebla partopreno en la **89a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Pekino de la 24a de julio ĝis la 31a de julio 2004**. *Ĉinio, kun historio de 5 mil jaroj, unu el la plej antikvaj civilizitaj landoj de la mondo. Pekino, ĉefurbo de Ĉina Popola Respubliko, kun 13 milionoj da loĝantoj, fondita antaŭ 3000 jaroj. Granda Muro, Imperiestra Palaco, la Terakotaj Militistoj kaj ĉevaloj ĉe la Maŭzoleo de Imperiestro de Qin-dinastio*... Tiel oni ekvarbas ĉe la ttt-ejo: www.espero.com.cn/uk2004/ - mi konsilas vin trarigardi kion oni proponas al vi kaj... pripensi!!!

FOCUS, magazeno kiu prezentas plej diversajn mondajn okazaĵojn per trafaj priskriboj kaj mirindaj fotoj, tuŝas, de tempo al tempo, ankaŭ prilingvajn argumentojn. Antaŭ jaroj en ĝi eĉ aperis artikolo pri artefaritaj lingvoj kaj Esperanto. Nu, jen kion mi trovis en la ekzemplero N° 133 – novembro 2003, en la rubriko NUMERI (Numeroj).

# Moderna Babilonio

**1** nura vorto, turkalingve, formas tutan frazon. Tial la turkaj vortoj estas tre longaj. Ekzemple "gelemeyecekesen" signifas "mi ne povas veni".

**2** diversajn vortojn oni uzas, en multaj lingvoj, malgraŭ ke la signifo restas la sama. Tio dependas, ĉu la vorto estas eldirita de virino aŭ de viro. Kamboĝanino neas dirante "cah", dum la viro "bat". Japanlingve, la ina ventro estas "naka", tiu vira "hara". Fakte la termino "harakiri", rilata al rita memmortigo, havas nur la viran genron.

**3** diverstipaj langklakoj eniĝas en la zuluan lingvon kvazaŭ ili estus normalaj alfabetaj literoj.

**5** diversaj lingvaj niveloj estas antaŭviditaj en la java lingvo. Ĉio dependas de la socia pozicio de la interparolanto. La diferenco kuŝas en la uzado de diversaj prepozicioj kaj adverboj.

**9** estas la voĉaj tonoj kiujn oni uzas por prononci ĉinajn-kantonajn vortojn. En la vjetnama lingvo ekzistas 6 diversaj tonoj por eldiri unu saman vorton. La termino "chao", ekzemple, se dirita pli laŭttone, signifas "riza supo", se mallaŭttone, signifas "ciao", samkiel la itallingva esprimo por saluti.

**27** diversaj kazoj troviĝas en la hungara lingvo. Grandega kvanto, se oni tion komparas ekzemple kun la latina, kiu havas nur ses. Tamen ankaŭ la estona ne malavaras je nombro de kazoj: entute 14!

**4.500** plej verŝajne estas la lingvoj kaj dialektoj parolataj ankoraŭ nun en la mondo.

**5.000** vortoj sufiĉas por esti taksata bona itallingva parolanto. Sed vortaro de klerulo devas enteni almenaŭ 80.000 terminojn!

**7.500.000** personoj en Germanio (eŭropa Lando kun la plej granda kvanto da enmigrintoj) parolas pli bone alian lingvon ol la germanan.

**341.000.000** da homoj sur ĉi tero havas, kiel patrinan lingvon, la anglan.

**1.000.000.000** da personoj en la mondo parolas la anglan lingvon kaj ĝin komprenas. Pro tio la brita lingvo estas probable la plej parolata idiomo en la mondo!

## VENU AL ĜENEVO!!!

UNUIĜINTAJ NACIOJ havas ĉefan sidejon en Novjorko kaj tiun eŭropan en Ĝenevo. En ĉi urbo okazos en decembro (de la 10ª ĝis la 12ª) pinta konferenco de ŝtatestroj kaj ministroj pri informado, kun jena temo "Ligu la neligitajn". Ankaŭ UEA klopodas oficiale partopreni la konferencon.

Aliflanke la svisaj geesperantistoj emus montri sin surtrate antaŭ la konferenco kaj varbadi pri Esperanto: kvankam la temo de la konferenco ne precize ligiĝas al lingvaj problemoj, tamen, ĉar multaj ĵurnalistoj estos tiam en Ĝenevo, la manifestacio povas akceli la pensojn.

Kiel eble plej multe da samideanoj estas petataj kunveni sabaton la 6ªⁿ de decembro 2003 je la 14ª h antaŭ la ĉefa stacidomo de Ĝenevo (kies nomo estas CORNAVIN).

## VENU AL ĜENEVO!!!

Ni kune marŝos al Palaco de la Nacioj, sidejo de UNUIĜINTAJ NACIOJ. Tie estas placo, kie ni staros kaj informos la publikon. Ni havu banderolojn kun frapfrazoj pri Esperanto kaj lingva demokratio. Fino estos ĉ. je la h. 16.30. Gazetara konferenco okazos ĵus antaŭ la marŝo. Ĉar ni ne deziras iri dekope, sed ŝatus atingi pli altan nombron: 100, 200, eĉ pli, ni petas la gesamideanojn, kiuj decidas veni, aliĝi antaŭ la 15ª de novembro ĉe Mireille Grosjean - cp 9 - CH 2416 Les Brenets; ret-poŝte: mireille.grosjean@rpn.ch

## Secondo Seminario di traduzione simultanea

Il seminario è rivolto a tutti coloro che intendono imparare a tradurre simultaneamente dall'esperanto all'italiano e viceversa.

Avrà luogo il 6-7 dicembre ad Ancona, presso la sede dell'Unione Ciechi (U.I.C.)
Via Leopardi, 5 - 60100 Ancona

IL SEMINARIO É GRATUITO. A carico del partecipante restano le spese di vitto ed alloggio presso l'ostello della gioventù oppure presso una struttura alberghiera. É previsto un contributo da parte della Federazione Esperantista Italiana e della Gioventù Esperantista Italiana.

L'ostello per la Gioventù si trova in
Via Lamaticci, 7 - 60100 Ancona - tel. 07142257

Chiunque fosse interessato è pregato di scrivere a Bethuel Chiesa: bethuel.chiesa@esperanto.it
Flavia dal Zilio - Via Cappella, 17/2 -31059 Zero Branco (TV); kuniklo@tiscali.it

Inoltre, sabato 6 dicembre, alle ore 21, nei locali della Mole Vanvitelliana, avrà luogo la seconda edizione del

### "Premio Zamenhof - le voci della pace".

Quest'anno il Premio che gli esperantisti italiani assegneranno alle tre personalità italiane che meglio hanno interpretato i valori di pace, di solidarietà, di amicizia tra i popoli e di tutela di tutte le culture sarà abbinato ad un concerto lirico. Nel luogo dove la Federazione Esperantista Italiana consegnerà il premio intitolato a Zamenhof sarà in allestimento la prestigiosa mostra dello scultore Francesco Messina.

## Federazione Esperantista Italiana: eletto il nuovo Comitato Esecutivo.

Sono stati eletti il Presidente (Aldo Grassini), il Vicepresidente (Luisa Oberrauch Madella) ed i membri del Comitato Esecutivo (Laura Brazzabeni, Michela Lipari, Gianfranco Polerani, Gianfranco Tomba, Marco Menghini). Il consiglio ha già discusso vari temi per preparare un piano di lavoro, che sarà votato nel prossimo consiglio nazionale ad Ancona il prossimo 7 dicembre.

# CONCORSO MARELLI 2004

In attuazione: **a)** delle disposizioni testamentarie del compianto esperantista Pier Luigi Marelli, **b)** della delibera del CN FEI del 3.10.93, **c)** della delibera del Consiglio di Amministrazione del Fondo Marelli del 9.11.97, è indetto un concorso per la **premiazione di giovani** in possesso del diploma di esperanto di 3° grado.

Il premio consiste in un viaggio gratuito a Pechino (Cina) - per poter partecipare all'89° Congresso Universale di Esperanto dal 24 al 31 luglio 2004 - oppure a Kokrov (Russia) – per il 60° Congresso Giovanile Internazionale dal 7 al 17 luglio 2004.

**Requisiti:** possono partecipare al concorso i giovani aventi i seguenti requisiti:
a) cittadinanza italiana; b) età minima 18 anni, età massima 30 anni compiuti al 1° gennaio 2004; c) possesso del diploma di 3° grado, rilasciato dall'Istituto Italiano di Esperanto o dall'ILEI/UEA; d) nessuna precedente premiazione nello stesso concorso; e) iscrizione alla FEI. I membri del Consiglio di Amministrazione e i loro familiari non possono concorrere.

**Definizione del premio.** Il premio coprirà le seguenti spese:
a) iscrizione al Congresso; b) viaggio col mezzo di trasporto più economico; c) soggiorno nella località congressuale in alloggi universitari o equivalenti; d) partecipazione ad una eventuale gita programmata dal Comitato Organizzatore del Congresso, intercalata nel corso del Congresso, con esclusione quindi di ogni attività turistica antecedente o susseguente al Congresso; e) assicurazione per l'assistenza sanitaria e contro gli infortuni in assenza di altre assicurazioni ed accordi internazionali, nelle forme e nei limiti fissati dal Consiglio di Amministrazione.
La somma che il Comitato destinerà per ciascun vincitore sarà devoluta in due tempi: l'80% circa anticipatamente, il saldo a rendiconto spese e previa relazione in esperanto sul viaggio effettuato.

**Modalità di presentazione della domanda: entro il 15.02.2004 dovranno pervenire alla FEI (indirizzo qui sotto)** le domande dei concorrenti e relativi allegati - a) certificato di cittadinanza, b) certificato di nascita, c) attestazione di conseguimento di diploma di 3° grado (il tutto in carta semplice), oppure autocertificazione con allegata fotocopia di documento d'identità valido.

**Valutazione dei candidati e assegnazione dei premi.** Il Consiglio di Amministrazione del Fondo si riunirà dopo la data di scadenza di presentazione delle domande per l'esame delle stesse e per la proclamazione dei vincitori. Nella valutazione si potrà tenere conto del punteggio conseguito negli esami e anche dell'attività svolta dal candidato nel movimento esperantista.

Per ulteriori informazioni:
**Federazione Esperantista Italiana**
Via Villoresi 38, 20143 Milano MI
tel./fax 0258100857
**Istituto Italiano di Esperanto**
via Montanara Sud 91, 46010 Campitello MN
Prof.ssa Laura Brazzabeni, tel. 0376 926099
*lbrazza@libero.it*

# Malferma Tago en la Centra Oficejo

Daŭrigas la jam tradiciaj rekontiĝoj ĉe CO: la $29^{an}$ de novembro 2003 la UEA-domo estos malfermita de la $10^{a}$ ĝis la $17^{a}$ h. Specialaj gastoj estos la polo Tomasz Chmielik kaj la franco Philippe Chavignon; en la Libroservo Ionel Onet salutos vin per minimume dek-procenta rabato. Tie, interesaj ĉi jaraj novaĵoj atendas vin - el tiu libra bukedo jen kelkaj floretoj: "Konciza Etimologia Vortaro" de A. Cherpillod, "Henriko Kvina" de Shakespeare, tradukita de H. Tonkin, "La Postdomo" de I. Ertl kaj "Esperanto sen mitoj" de M. Sikosek.
Tomasz Chmielik, tradukinto i.a. de "La lada tamburo" de Grass, prelegos pri du pioniroj de UEA, nome: *Edmond Privat – efektiviganto de utopioj*, kaj *Pri la penso de Hector Hodler*. Philippe Chavignon parolos pri *Mondvojaĝo tra Panjo-Naturo, lingvoj kaj gentoj*.
La Centra Oficejo troviĝas je strato Nieuwe Binnenweg 176, atingebla de la ĉefa stacidomo pere de tramo 4.

## Mallonge pri...

**Ĝangalo lanĉas kampanjon por TV en Esperanto** La administracio de la portalo **Ĝangalo.com** lanĉis internacian kampanjon por la establo de la unua televidkanalo tute en Esperanto. La iniciato havas la apogon de UEA kaj de Esperanto-Societo Kebekia. Oni povas havi pliajn informojn ĉe la portalo de la kampanjo Projekto ITV - http://gxangalo.com/televido.
**Matematika vortaro kaj oklingva leksikono** aperis fare de Marc Bavant. En la libro troviĝas vasta aro da matematikaj esprimoj en la ĉeĥa, germana, angla, franca, hungara, pola, rusa lingvoj kaj en Esperanto. La libro estas fruktodona rezulto de internacia kunlaboro. Ĝin eldonas la ĉeĥa Esperanto-eldonejo KAVA-PECH. La vortaro mendeblas ĉe la eldonejo kaj en grandaj libroservoj.
**Centjariĝoj serĉataj!** Mi planas kompili artikolon pri la temo "Jubileaj festoj". Fakte nun amasiĝas ĉie en la movado festoj okaze de centjariĝoj (i.a. 100 jaroj de Esperanto en Japanio, Svislando, Germanio, Bulonjo en 2005, UEA en 2008). Mi nun ŝatus kolekti informojn pri ĉiuspecaj centjariĝoj por povi poste kompili artikolon. Pri ĉio ĉi bv. kontakti min individue retpoŝte: Marko Naoki LINS - Brusela KomunikadCentro (BKC) EEU - Rete: marko.lins@lingvo.org Tel. +32-498-133.177
**Kroata Esperanto-kunloĝado** Esperanto-Societo BUDE BORJAN, Studenta Esperanto-Klubo kaj Kroata Esperanto-Junulara Asocio translokiĝis. Ĉiuj havas novan adreson, la saman kun KROATA ESPERANTO-LIGO:
Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio
**La Ĝenerala Direktoro demisias** La estraro de UEA ricevis la peton de Trevor Steele forlasi sian postenon pli frue ol la antaŭe interkonsentita momento, pro personaj kialoj. Li restos en Centra Oficejo ĝis la $1^{a}$ de aprilo 2004, donante tiel sesmonatan tempperiodon por serĉi anstataŭanton. Steele laboris proksimume 21 monatojn, dum periodo ege malfacila por nia Asocio kaj ties laboristaro. Laŭ intervjuo kun li, farita de *Libera Folio*, li simple deklaris ke tiun decidon li prenis post konstato, ke administrajn laborojn li ne tro ŝatas kaj ke li pli bone povas servi al Esperanto en tute aliaj roloj.

## Internacia Esperanto-Muzeo translokiĝos

"Spite gazetajn raportojn pri la malo, Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno fartas bone kaj kreskas. Ĉiujare la muzeo plenumas informpetojn de 2 mil personoj el la tuta mondo. Jam ĉiuj libroj de la muzeo estas enkomputiligitaj kaj troveblaj en la datenbanko Trovanto. Nun oni enkomputiligas la gazetojn. Post kelkaj jaroj la muzeo ricevos novan oportunan ejon" tiel diras la direktoro de IEM en Vieno, Herbert Mayer.

Li refutas raportojn aperintajn antaŭ la somero en la Esperanto-gazetaro, ke la muzeo estus endanĝerigita. En la julia statistiko pri la specialaj interretaj serĉiloj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, Trovanto troviĝis, unuafoje, je la unua loko, pro 1078 konsultaĵoj.

IEM havas plian bonan novaĵon: estas nun definitive decidite, ke Internacia Esperanto-Muzeo translokiĝos. Tio okazos verŝajne en 2006 aŭ 2007. La nova sidejo estos teretaĝe, en *Herrengasse*, apud la Ministerio pri Internaj Aferoj, nur 200 metrojn for de la nuna loko. En la novaj ejoj, ne tiom grandaj sed ĝuste novkonceptitaj por pli adekvate informi la publikon pri Esperanto.

En sia pli ol 70-jara ekzisto la biblioteko de IEM en Vieno daŭre pliampleksiĝis kaj estas hodiaŭ la plej granda kolektaĵo pri Esperanto kaj interlingvistiko. Ĝi ankaŭ travivis la plej teruran periodon por Esperanto, nome la hitlerismon. Fondita en 1927 de Hugo Steiner, la kolekto por planlingvoj fariĝis parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929. Pro spacbezono la tuta muzeo denove translokiĝis en 1930 el ĉeval-stalo kaj monak-ĉelo en la imperian palacon, rekte en grandan salonegon de Hofburg. La enmarŝo de Hitler en Aŭstrion havis terurajn konsekvencojn por la Muzeo: Esperanto iĝis malpermesita lingvo!

Post trimonata aresto la fondinto Hugo Steiner liberiĝis kaj ĝustatempe sukcesis persvadi la koncernajn instancojn ne detrui la materialon de IEM , sed nur forpaki kaj meti ĝin en kelon. Speciale kruelan sorton suferis unu el la laborantoj en la Muzeo: Gustav Weber estis mortturmentita en koncentrejo kelkajn tagojn antaŭ la liberigo de Aŭstrio en 1945.

Hodiaŭ IEM posedas 25.000 volumojn, 2.000 muzeajn objektojn, 2.000 aŭtografojn kaj manuskriptojn, 13.000 fotojn, 1.100 afiŝojn kaj 40.000 flugfoliojn. Ili plejparte estas interrete troveblaj dank' al la programo Trovanto.

"Planlingvoj estas grava elemento kadre de la lingva kreivo de homoj. Ilin priskribas tiu sciencobranĉo, kiun ekde la unua duono de la 20ª jarcento oni nomas interlingvistiko. Post unuaj mezepokaj provoj nur ekde la 16ª jarcento aperas la unuaj ellaboritaj planlingvoj. Ilia celo estis roli kiel instrumento de logika kaj filozofia pensado. Multaj gravaj personoj de la Eŭropa intelektularo okupiĝis pri la temo, i.a. Francis Bacon, Komenio (Jan A. Komensky, alinome Comenius), Kartezio (Descartes) kaj Lejbnico (Gottfried W. Leibniz). IEM rolas kiel muzeo, biblioteko, arkivejo, kaj estas la plej granda lingvistika libraro pri planlingvoj," klarigas la respondeculoj Christian Cimpa, Helga Farukuoye kaj Herbert Mayer.

La instituto kolektas ankaŭ materialojn pri tute nekonvenciaj provoj solvi la lingvoproblemon, ekzemple per revivigo de klasikaj lingvoj. "La modernaj komunikaj teknologioj proponas ankaŭ al malgrandaj lingvokomunumoj novajn eblojn: la latina fariĝis en interreto denove tute vivoplena lingvo, same kiel ankaŭ la antikva greka, kiu neniam ĉesis roli kiel literatura lingvo tra la jarmiloj." Ankaŭ sur la tereno de la biblioteko la laboro progresas. Post la enkomputiligo de ĉiuj libroj kaj broŝuroj, nun sekvas la gazetoj. "Nia katalogo en interreto, daŭre kreskas kaj enhave kaj laŭ teknologio." Proksimume fine de la jaro Trovanto baziĝos sur nova biblioteka sistemo, kiu estas tiu de la Aŭstriaj sciencaj bibliotekoj. "Ni laborantoj en IEM speciale ĝojas pro la fakto, ke en tempo, kiun multaj nomas kriza, nia instituto sukcesas kreski kaj fariĝi pli forta. Ne estante movada, IEM pere de sia informa laboro tamen daŭre helpos kaj subtenos la movadon."

*Informis: Dafydd ap Fergus*

**Se vi lernas aŭ instruas Esperanton**

**JUNA AMIKO**

**estas via plej bona amiko**

**Helpilo por instruistoj**

- Portu pli da viglo kaj vario al viaj lecionoj
- Elspezu malpli da tempo preparante viajn lecionojn
- Disponi je zorge kontrolitaj tekstoj kun antaŭkonebla vort-trezoro (videbla en la hejmpaĝo)
- Kontribuantoj el 20 landoj kaj legantoj en 60

**Instigilo por lernantoj**

- Uzu vian lernatan lingvon por legi artikolojn kaj partopreni en konkursoj
- Trovu korespond-partnerojn kaj ret-amikojn el ĉiuj kontinentoj
- Ricevu kantojn, poemojn, ludojn, informojn kaj rakontojn, kun belegaj desegnaĵoj

**Movilo por la movado**

- Servante al la internacieco kaj praktika aplikado de Esperanto tra pli ol 30 jaroj
- Kreilo de pozitiva sinteno ĉe junuloj al transnaciaj kaj interkulturaj kontaktoj
- Helpilo por firmigi la instruadon de Esperanto en ne ĉiam facilaj cirkonstancoj

Temas pri tre grava lernilo kaj lernigilo: ne permesu ĝian malaperon pro manko de abonantoj en la pagopovaj landoj! Jara abono kostas 12 eŭrojn kaj vi ricevos 28-paĝan revuon kvarfoje jare.

Peranto en Italio: Luigia Oberrauch Madella
Via Prampolini, 8 43100 Parma
pianetaurano@libero.it
Hejmpaĝo de Juna Amiko:
www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto

**Abonu kaj abonigu ĝin!**

Fonto por la informoj: **Ret-Info, Nun** kaj **Nova Sento**.

Bulteno de Triesta Esperanto-Asocio
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it
**http**://arte.triesteincontra.it/esperanto
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349